

Henri Masson

La « donaco » de Gordon Brown al la mondo

“ Neantaŭvidebla ”

Iama direktoro de la gazeto "Le Monde", [Jean-Marie Colombani](#) estas el tiuj, kiuj plej kontribuis al ebenigo de la vojo al invado de la angla lingvo en Francio. Li ricevis en 2002 la mokpremion de "civitana maldigno" de la [Académie de la Carpette anglaise](#) (1) pro tio ke li publikigis sabatan anglalingvan suplementon al "Le Monde" konsistanta el artikoloj el "New York Times". Post la atencoj de la 11a de septembro 2001 en Usono, li skribis ĉefartikolon sub la titolo "Nous sommes tous Américains !" (Ni ĉiuj estas usonanoj !) ! Malmultaj estis tiam, kaj estas fakte ankoraŭ nun, ne nur en Francio, la homoj kiuj konsideras sin tiaj... Esti nur *homo sapiens* (pensanta homo), ne kopio, imitaĵo aŭ klono, tio estas jam belega kaj ne facile plenumbla programo!

Okaze de televidelsendo "Ripostes" (Viglaĵ rebatoj) de [Serge Moati](#), ĉe **France 5**, la 15an de februaro 2009, li aplombe asertis ke la nuna ekonomia krizo estis neantaŭvidebla (2). Kaj tio dum anglalingvaj specialistoj, inter kiuj [Nouriel Roubini](#) (jam fine de 2006 !), [David Rosenberg](#), [John Paulson](#), [Jeremy Grantham](#), [Howard Marks](#) (3) kaj eĉ, ankoraŭ pli frue (en 1994), la spekulaciisto [George Soros](#), avertis pri danĝero de krizo, recesio kaj ĥaoso (4). Plejparto el la dommastrinoj, eĉ sen diplomo de supera instruado, nek scipovo de la angla, kapablas mastrumi familian budĝeton, sed Colombani, malgraŭ privilegiitaj informfontoj kaj scipovo de la lingvo de Davos kaj Wall Street, kiu superregas en ekonomio, ne kapablis antaŭvidi gravan ekonomian tutmondan danĝeron.

Responde al invito de la Hoover-Institucio, kies honora membro ŝi estas, Margaret Thatcher prelegis la 19an de julio 2000 en Stanford-Universitato pri la temo "A Time for Leadership" (Tempo por estrado). Ŝi diris :

"En tiu 21a jarcento, la superreganta povo estas Usono, la superreganta lingvo estas la angla, la superreganta ekonomia modelo estas la usona-angla kapitalismo." (5)

En tiu ankoraŭ nova jarcento kaj jarmilo, kiujn oni bondeziris pli saĝa antaŭ malpli ol dek jaroj, la tuta mondo, inkluzive de Usono kaj Britio, ricevis pli ĝustan ideon pri tiu "modelo". La homaro ekrikoltis, rikoltas kaj plue rikoltos ankoraŭ longtempe ties venenajn produktojn. Minacoj ŝvebas ankaŭ super usonaj kaj britaj entreprenoj kaj eĉ bankoj iam potencegaj. Rande de bankroto estas nun, en Usono, la plej famaj gazetoj, inter kiuj "Chicago Tribune", la prestiĝa "Los Angeles Times" kaj pli ol tridek aliaj. La 8an de decembro 2008, la tre influa gazeto "New York Times" estis devigata hipoteke sian novan 52-etaĝan sidejon de Manhattan por garantii prunton de 225 milionoj da dolaroj... (6) Oficiale anoncita estis, la 19an de majo 2009, la jam de kelkaj monatoj antaŭvidita financa bankroto de Kalifornio, la plej riĉa ŝtato el riĉega lando.

Multaj estas nun, en la diversaj registaroj de la mondo kaj en decidaj postenoj, homoj kiuj longtempe studis, laboris aŭ vivis en Usono aŭ en Anglio. Tie ili enkapigis influojn, ideojn, principojn, modelojn, kondutojn, kutimojn kaj morojn el kiuj multaj ne taŭgas por la tuta homaro kaj kiujn la popoloj ne pretas akcepti (7). Iama franca ministro de edukado, Claude Allègre, kiu finis siajn studojn en Usono, diris en La Rochelle, la 30an de aŭgusto 1997 : "La francoj ne plu konsideru la anglan kiel fremdan lingvon". Li estis pro tio inter la elektitoj por la mokpremio 1997 de "civitana maldigno" de la Académie de la Carpette anglaise. Sed, nur du jarojn poste, li tute naive miris, kun la deputito Pierre Moscovici, pri la hegemonia situacio de Usono, t.e. de lando por kiu la

angla estas denaska, por kiu ĝi ne postulas kroman strebon kaj foroferon, do efektive tute ne fremda : *"La motivoj de maltrankviliĝo kaj angoro ne mankas pri la estonteco kaj influo de nia kulturo fronte al tio, kion sinjoroj Claude Allègre kaj Pierre Moscovici nomis tiun eksterordinaran maŝinon de intelekta invado, kiun de nun konsistigas Usono"* (8). La konsiderinda sumo da fortoj, tempo kaj mono foruzata en Francio kaj aliaj neanglalingvaj landoj por atingi plejofte nekontentan nivelon en la angla estas uzata en Usono por scienca esplorado, ekspluatado de akumulitaj konoj, profesia perfektigo, kreiva kaj produkta aktivado, sporta trejnado, pliboniĝo en difinitaj fakoj kaj aktivaĵoj, ktp. Laŭ la semajnmagazino **"Le Point"** (17an de aprilo 1999), en Francio : *"La lingvoj sendube reprezentas inter 10 kaj 20 % de la strebo de entuta instruado de la entreprenoj, taksata je 32 miliardoj da frankoj entute [t.e. nun 4 878 368 551,59 €]. Multaj entreprenestroj diras ke ili volas dulingvulojn dum, en plejparto el la kazoj, ili ne ĉiutage bezonas la anglan. Nu, ili samtempe perdigas kompetencon al siaj kadroj pro manko da praktiko!"*.

Nenio estis neglektita por influi ankaŭ la "eliton" de neanglalingvaj landoj per konferencoj, publikaĵoj, subvencioj. En 2009, en Sarkozy-lando, diversaj planitaj kaj efektivigitaj reformoj havas originon en la "modelo" angla-usona, kiun li admiras kaj strebas imiti, eĉ simii. Lia favoro al nurangleco bonaspektas en la [bling-bling](#)eca umajaro de vanta prezidento ŝatanta montri sin kun luksaj brakhorloĝoj kaj sunokulvitroj de famaj markoj, pavi kun riĉeguloj, kaj kies politiko inspiras kaj ĝojigas la humoristojn (9) sed ne la francan popolon. Okazas la malo de tio, kion li promesis en jena [parolado de la 9an de marto 2007, en Caen](#), kelkajn semajnojn antaŭ ol fariĝi prezidento (16an de majo) : *"La obsedo de unika lingvo pretekste de efikeco estas trompogilo, kiu maskas la efikojn de superrego de la unika penso por kiu la unika lingvo estas atendejo. Sed eĉ ne pruvita estas la efikeco : la Renesanco, dum kiu ĉiuj homoj ekpensis kaj ekverkis en sia nacia lingvo, estis pli fekunda por la homa penso ol la longaj jarcentoj de ekskluziva superrego de la latina, kvazaŭ la kreiveco*

estus absolute nedisigebla de la diverseco. Se mi estos elektita, mi lokigos la francparolantaron je la rango de la diplomataj prioritatoj de Francio. Mi samtempe plifortigos la aranĝon de kultura agado de Francio eksterlande kaj la helpon al kreado, ĉar per la kreado radias la franca. Mi zorgos ke en ĉiuj entreprenoj instalitaj sur la franca teritorio, la laborlingvo estu la franca de kiam ne estas necesa ekonomia kaj komerca neceso, kiu devigas esprimiĝi en alia lingvo.

Mi batalos por ke en la eŭropaj instancoj kaj en UN la franca estu plue uzata. Komprenoble, tio estos absoluta devigo por ĉiu reprezentanto de Francio en la internaciaj organizoj.

Ĉefe mi batalos por ke estus ĝeneraligata, ĉie en Eŭropo, la instruado de du fremdaj lingvoj, ĉar tio estas la sola efika maniero por ke la hegemonio de la angla estu disbatita."

Fakte, en nur du jaroj de lia regado, pli kaj pli trudiĝis la angla en la vivo de la francaj civitanoj kaj en la instrusistemo. Prezidento Sarkozy prisilentas la fakton ke, nun, kaj jam de longe antaŭ ol li mastrumis la aferojn de Francio, estis fortaj premoj por devigi la esploristojn redakti siajn laborojn en unika lingvo : la angla. Kaj ne ĝenas lin ke liaj ministroj puŝas al uzo de la angla, akcentas kaj akcelas tiun evoluon al unika lingvo, al unika penso.

En la registaro, kiun li starigis, lia ministro pri Edukado, Xavier Darcos, privilegias senlime la instruadon de la angla; lia ministrino pri Ekonomio, Christine Lagarde, kiu longe vivis en Usono, kaj havis respondecojn sine de la Centro por Strategiaj kaj Internaciaj Studoj (Center for Strategic and International Studies — [CSIS](#), evidente je la servo de la usona registaro) kaj rilatojn kun, i.a., Zbigniew Brzezinski kaj Dick Cheney, komunikas kun siaj servoj, en sia ministerio, en la angla (pri tio okazis [incidento ĉe la Nacia Asembleo la 16an de oktobro 2007](#), kiam deputito Brard faris tiurilatan demandon al ŝi); lia ministrino pri Esplorado, Valérie Pécresse, kiu samopinias kiel Claude Allègre, ke la angla ne devas esti konsiderata kiel fremda lingvo, volas ke instruado de diversaj lernobjektoj en

la universitatoj okazu rekte en la angla kaj ke la esploristoj publikigu siajn laborojn en la angla; lia ministrino pri Kulturo kaj Komunikado, Christine Albanel, esprimis al la TV-magazino "Télé 7 Jours" sian ŝaton pri usonaj TV-serioj sed prefere... rekte en la angla; lia iama ministro pri Laboro, Socialaj rilatoj kaj Solidareco, Xavier Bertrand, tre fidela proksimulo, fanfaronas pri ĉiutaga legado de "The International Herald Tribune"; lia ministro pri Eksterlandaj aferoj, Bernard Kouchner, kiu subtenis la militon de G. W. Bush en Irako, en 2003, montras grandan emon paroli prefere angle ol france, eĉ kiam nenio devigas al tio. Pri diplomatia incidenteto rezultanta el lingva eraro de Bernard Kouchner en la angla, en Jerusalemo, Lucile Davier, de la Asocio de Studentoj en Tradukado kaj Interpretado ([Association des Étudiants en Traduction et Interprétation](#))

skribis "En epoko kiam oni vantas la meritojn de la angla kiel lingua franca en la scienco, en komerco kaj en politiko, la peripetioj de s-ro Kouchner pruvas al ni, ke ĉiuj homoj ne estas egalaj fronte al la politiko « nurangla »." En libro aperinta sub la titolo "[Deux ou trois choses que je sais de nous](#)" (Du aŭ tri aferoj, kiujn mi scias pri ni — Parizo : Robert Laffont. 2006), Kouchner skribis : "Nove alvenita en la registaro de la Respubliko, mi miris, en 1988, ke oni insistis pri la deviga uzo de la franca por la ministroj" (p. 147). "Post prikonsidero de ĉio, eĉ riĉa je nekompereblaj potencialoj, la franca lingvo estas ne nepre necesa : la mondo bone vivis antaŭ ĝi. Se ĝi devus cedi lokon, tio estus precize al lingvoj pli bone adaptitaj al la realaj kaj tujaj bezonoj de tiuj, kiuj forlasus ĝin." (p. 151)

La « donaco » de Gordon Brown al la mondo

En 1961, en Kembriĝo, okaze de konferenco, Britio kaj Usono kaŝe interkonsentis pri iaspeca lingva Jalto, t.e. pri lingva dispartigo de la mondo, pri novforma koloniado per la angla lingvo. En la tiam publikigita raporto, Britio, Usono kaj aliaj anglalingvaj landoj nun apartenantaj al la spionreto "[Echelon](#)" estis konsiderataj kiel "la Centro", kaj la cetera mondo, inkluzive iamajn koloniojn de Britio, i.a. Hindio, kiel "la Periferio". Pri la enhavo kaj celo de tiu raporto, nealirebla al la publiko, profesoro [Robert Phillipson](#), aŭtoro de la libro "[Linguistic Imperialism](#)" (10), jene raportis kaj komentis : "La instruado de la angla al denaskaj neanglalingvanoj povas definitive transformi la studentaran tutan mondon. Se kaj kiam nova lingvo iĝas vere funkciiva en subevoluinta lando, la studentara mondo iĝas restrukturita. Iu ministerio pri Edukado – sub naciisma premo – povas ne bone taksi la interesojn de iu lando... Naciisma spirito povus ruinigi ĉian esperon pri la angla kiel dua lingvo. La angla iĝis ne nur la reprezentanto de la nunaj anglolingvanaj penso kaj sento sed ankaŭ la vehiklo de la tuta evoluanta homa tradicio : de la plejbono (kaj de la plejmalbono), kiu estis pensita kaj sentita de la homaro en la

tuta homa historio. Tio estas elklarigo de la anglalingva imperiismo, por ĉiuj homoj en ĉiuj tempoj. Ĝi pretendas, ke la angla estas la nura lingvo, kiun la moderna mondo bezonas. Ĝi asertas, ke novsendependaj landoj povas, pro naciismaj kialoj, tiel erari ke ili rezistas al la angla, kaj ke, en tiaj okazoj, ilia volo devas esti superregita. Tio estis por la politika kaj komerca intereso de la anglolingvanaj landoj." (11)

La tereno estis jam preparita en 1934 en Nov-Jorko, okaze de konferenco pri la temo "The use of English as a world language" (La uzo de la angla kiel mondlingvo), kiun patronis la Fondaĵo Carnegie. Mision ricevis lingvospecialistoj por krei lingvon malprofite al la aliaj por tiel faciligi la penetradon de la angla. Ankaŭ en 1934, Charles Kay Ogden, semantikisto el Kembriĝo, proponis formon de simpligita angla sub la nomo "Basic English" (British American Scientific International and Commercial). Li skribis : "Plej utilus al la mondo plia milo da mortintaj lingvoj — kaj unu plia vivanta" (12). Kuraĝigis kaj subtenis lin [Winston Churchill](#) kaj prezidento [Franklin Roosevelt](#). Pri Basic

English, Churchill skribis en julio 1943 al BBC : "Mi estas tre interesata pri la demando de baza angla lingvo. La disvastigita uzado de tio estus gajno multe pli daŭra kaj fruktodona ol la aneksado de grandaj provincoj" (13). La Brita Konsilio ([British Council](#)) estis fondita en 1935 por antaŭenigi, per la angla, malantaŭ kultura masko, la interesojn de Britio.

La raporto pri la angla-usona konferenco de 1961 jam skizis la ĉefajn liniojn de projekto de servutigo de la mondo per la angla : transformi per ĝi la mensajn strukturojn kaj malebligi rezistadon kontraŭ tio : "La raporto proklamas ke la Centro havas la monopolon de la lingvo, de la kulturo kaj de la ekspertizo kaj ne devus toleri reziston al la regulo de la angla." (...) Se la ministroj de Edukado, blindigitaj pro sia naciismo rifuzas... estas la devo de la anglalingva kerno preterignortion." (14)

La vera celado de la Brita Konsilio, ĝia reala ambicio, konfirmiĝis en ĝia jarraporto 1968-1969 (p. 12) : "Estas elemento de komerceco kaŝita en ĉiu anglalingva instruisto, libro, revuo, filmo, televidprogramo sendita transe de la maro. Nu, se ni estas eltirantaj politikan, komercan kaj kulturan avantaĝon de la tutmonda uzo de la angla, kion ni faras por pluteni tiun pozicion ?". Do, temas pri io tute alia ol nura diskonigo de la brita kulturo.

En 1971-72, antaŭ ol eniri la tiaman Komunan Merkaton, la 1an de januaro 1973, la brita registaro atribuis kroman financon subtenon de 16% al la Brita Konsilio, evidente ne nur por eltiri "politikan, komercan kaj kulturan avantaĝon de la tutmonda uzo de la angla" kaj "pluteni tiun pozicion", sed ĉefe por instali la anglan lingvon en la rolo de ĉeflingvo dum Britio estis ĉiam ekster la strebo por konstrui sendependan, aŭtonoman, unuecan kaj pacan Eŭropon.

La 12an de oktobro 1978, sub la titolo "English is a Profitable Export", la gazeto "The International Herald Tribune" triumfe anoncis ke la angla estas profitodona eksportaĵo.

Direktoro de tutmonda ĉeno de lernejoj de la angla skribis en la sama periodo : "Estis tempo kiam ni kutimis sendi eksterlanden kanonŝipojn kaj diplomatojn; nun ni sendas profesorojn pri angla lingvo." (15)

En la Jarraporto por la jaroj 1987-1988 (p. 48), aperas jena eldiro de direktoro de la Brita Konsilio : "La vera « nigra oro » de Britio estas ne la nafto de la Norda Maro, sed la angla lingvo ... La defio kiun ni alfrontas, estas plene ekspluati ĝin." (16)

En 1991, la gazeto "Daily Mail" anoncis : "Nia lingvo tute proksimiĝis al universaligo. Jen antaŭ kelkaj jaroj, ĝi estis akceptita kun la franca kiel unu el la du ĉefaj lingvoj de la Ekonomika Eŭropa Komunumo [EEK]. Nun ĝi devas fariĝi la unika oficiala lingvo de la Komunumo."

En 1992, en sia numero de la 7a de julio, "International Herald Tribune" plej klare konfirmis la celon de tiu lingva politiko : "La uzado de la angla kreskigas la politikan influon de la anglalingvaj landoj multe pli potence ol forta ekonomio aŭ armila potenco".

Profesoro pri lingvo en edukado en la Universitato pri Teknologio de Sidnejo, Aŭstralio, Alastair Pennycook instruis la anglan en Hongkongo kaj en Ĉinio kiam li estis studento. Ekde tiam, li ekkonsciis ke la angla restas peze ligita al koloniisma pasinteco. Li raportis pri siaj spertoj kaj pripensoj en du libroj : en 1994 en "The cultural politics of English as an international language" (17) kaj, en 1998, "English and the Discourses of Colonialism" (18). Inter liaj kontribuajoj al la temo estas ankaŭ "The myth of English as an International Language" (La mito de angla kiel Internacia Lingvo) en la libro "Disinventing and Reconstituting Languages" (2006) kaj "ELT and colonialism" (2007. ELT = English Language Teaching / Anglalingva instruado).

Naŭdek jarojn antaŭ ol aperis "English and the Discourses of Colonialism", en 1908, Gandhi, kiu havis pri la angla tute alian

sperton ol denaska parolanto, respondis al demando pri la neceso lerni ĝin : “Havigi al milionoj da homoj konon de la angla, tio estas sklavigi ilin“ (...) “Notindas ke, ricevinte anglalingvan edukon, ni submetis la nacion.“ (19). Li ankaŭ skribis pri ĝi “La sinturno al fremda lingvo en Hindio por plenumi la superan instruadon kaŭzis al la nacio nekalkuleblan moralan kaj intelektan damaĝon.“ (20)

La 25an de februaro 1995, "The Times" de Londono publikigis artikolon sub la titolo "The triumph of English" kun subskribo de S. Jenkins : “Kiam finiĝis la Pakto de Varsovio, tio okazis en la angla. Kiam la G7 kunvenas, tion ĝi faras en la angla. La angla estas la universala lingvo de informadiko, de la informagentejoj. La sola internacia organismo, kiu plue uzas « fremdan » lingvon, estas la Eŭropa Komisiono de Bruselo. Kun iom da ŝanco, ni metos finpunkton al tio !” (21)

En gazetara dosiero publikigita en marto 1995 por lanĉi kampanjon "English 2000", la Brita Konsilio skribis ke la angla lingvo estas subtenata kun celo "ekspluati la pozicion de la angla por la britaj interesoj kiel unu el la aspektoj de la pluteno kaj plivastigo de la rolo de la angla kiel mondlingvo dum la venonta jarcento" (22). Malmultaj estas, en la intelektularo kaj t.n. “elito“ de la neanglalingvaj landoj, tiuj, kiuj komprenis ke la interesoj de Britio kaj de la cetera mondo tute diverĝas. Male, ekzistas nekontestebla konverĝo inter Britio kaj Usono, kaj en Usono mem inter respublikanoj kaj demokratoj, por ekspluati kaj plue certigi, proprainterese, tiun hegemonion, tiun superregon, tiun satelitigon, tiun novaspektan koloniadon de la mondo fare de malpli ol 5% el la monda loĝantaro.

En 1996, la franca registaro protestis kontraŭ decido de NATO flankenpuŝi la francan el la rolo de oficiala lingvo, tio dum la konferenco de la Franclingvano (Francophonie, en Monako, 25-29 de marto 1996) (23). Laŭ "Le Journal des Finances" (22-28 de marto 1997) : "En Davos, dum la fama Monda Ekonomia Forumo (World Economic Forum), la franca estis forĵetita el la akceptitaj

lingvoj. Necesas tie paroli angle, kaj niaj reprezentantoj la plej famaj akceptas tiun diktaton nome de anglosaksa tutmondiĝo."

Vic-sekretario pri komerco por la internacia komerco sub la administracio Clinton [David Rothkopf](#) skribis en la somera numero de 1997 de "Foreign Policy", trimonata usona magazino pri geopolitiko kaj internacia ekonomio : “Estas en la ekonomia kaj politika intereso de Usono zorgi ke, se la mondo adoptos komunan lingvon, ĝi estu la angla; ke, se ĝi orientiĝas al komunaj normoj pri telekomunikado, tiuj normoj estu usonaj; ke, se ĝiaj apartaj partoj estas kunligitaj per la televido, la radiofonio kaj la muziko, la programoj estu usonaj; kaj ke, se ellaboriĝas komunaj valoroj, ili estu valoroj en kiuj usonanoj sentu sin komforte.“ (24)

Pri usonaj normoj, ne nur en telekomunikado, por ke "usonanoj sentu sin komforte" en la tuta mondo, plue uzataj estas la arkaa, mallogika kaj malpraktika anglo-saksa mezursistemo, ekzemple por la dimensioj de televid- aŭ komputil-ekranoj, konteneroj, pneŭmatikoj, por fokusaj distancoj de objektivoj de fotaparatoj kaj kameraoj, por paperformatoj aŭ tiparoj en presejoj, por la kapacito de la rezervujo de agrikulturaj kaj ĝardenaj ŝprucigiloj, ktp.

Iama konsilanto de [Jimmy Carter](#) por la internaciaj rilatoj kaj pri interna sekureco, konsilanto de [Barack Obama](#) dum la prezidentaj balotoj de 2008, Zbigniew Brzezinski forte influis la eksterlandan politikon de Usono. En 1997, li publikigis libron sub la titolo “The Grand Chessboard. American Primacy and its Geostrategic imperatives“ (La Granda Ŝaktabulo. Usona Supereco kaj ĝiaj geostrategiaj imperativoj) en kiu li malkaŝe skribis ke ”Okcidenta Eŭropo restas plejparte usona protektorato, kaj ĝiaj ŝtatoj memorigas, kio estis iam antaŭlonge la vasaloj kaj la dependantoj de malnovaj imperioj“. Li aldonis ke alianciteco inter Usono kaj Eŭropo estas malegala sed ke estas vere, ke malsimetrio de regpovo inter ambaŭ devus probable ankoraŭ plifortiĝi profite al Usono. (25)

Jam pli frue, en raporto publikigita en 1992, Paul D. Wolfovicz, tre influa kapo en Pentagono kaj en la usona registaro ekde la epoko de Nixon, precipe en tiu de G. W. Bush, same klare skribis ke Usono devas konservi sian statuton de unika superpotenco, ke necesos malhelpi Eŭropon kaj Japanion superi ĝin, ke NATO, vehiklo de la usonaj interesoj en Eŭropo, devas resti la ĉefa garantianto de la sekureco sur la malnova kontinento (26). Sub administracio, ĉu demokrata, ĉu respublika, tio tre similas al la "sekureco" kaj "protekto", kiun garantias prostituisto al prostituitino, aŭ al bordelestrino kiu "defendas" la interesojn de siaj "protektatinoj".

La 20an de februaro 1997, Madeleine Albright, tiam ŝtatestetariino de la demokrata prezidento Bill Clinton, deklaris : "Unu el la ĉefaj celoj de nia registaro estas certigi ke la ekonomiaj interesoj de Usono povos esti disvastigitaj planedskale."

En sia numero de la 13a de majo 1997, "Le Figaro" jene eĥis pri projekto de Robin Cook, tiam nova sekretario de la Oficejo pri eksterlandaj aferoj de Britio (Foreign Office) en la registaro de [Tony Blair](#) : "Li volas ne nur redoni al la brita diplomatio brilon kiun, laŭ li, la konservativa administracio makulis, sed li deziras ke estonte Britio gvidu la mondon. Pace, memkompreneble. Per la sola forto de ĝia ekonomio, de ĝia kreiva genio, de ĝia kulturo kaj de ĝia lingvo."

Kreiva genio ekzistas ĉie en la mondo, ne ekskluzive en Britio. Ĉu vere la "kreiva genio" de Britio speguliĝas en lingvo, kiun la anglaj infanoj mem, laŭ [studo de 2004](#), plej laste kapablas legi kompare kun la aliaj eŭropaj infanoj en ilia propra lingvo ? Ĉu en lingvo, kiu estigas la plej altan procenton da disleksiuloj (27) ? Ĉu en lingvo por kiu sentiĝis la bezono krei specialan litertipon por faciligi ties legadon ? (28). Ĉu en lingvo pri kiu Gandhi jene plendis : "Pli ol duono el nia tempo estis dediĉita al lernado de la angla kaj al regado de ĝiaj arbitraj ortografio kaj prononco. Estis peniga sperto devi lerni lingvon, kiu ne prononciĝas tiel, kiel ĝi skribiĝas. Stranga estis la sperto devi parkeri

la prononcon" (29). Ĉu en lingvo tiel malfacile prononcebla por koreaj infanoj, ke ties gepatroj turnas sin al kirurgoj por operacio konsistanta el entranĉo de la langa frenulo (30) ? Ĉu en lingvo pri kiu skribis Kin Hiongun, korea esploristo, responde al enketo de **BBC** en junio 1998 : "En Koreio, ni elspezis enormajn sumojn da mono por lerni la anglan. Kalkulante laŭ propra sperto, sen la devigo lerni la anglan, mi estus obteninta kvin doktoriĝojn." (Enrique Elleberg: "[Around the World with Esperanto](#)"). Diversaj atestoj pri la malfacileco de la angla por azianoj aperas en franclingva artikolo de Claude Piron, i.a. en "[Asie : anglais ou espéranto ?](#)". Ĉu en lingvo pri kiu la granda angla verkisto [Charles Dickens](#) agnoskis en letero de la 7an de julio 1850 al sia amiko kaj biografo John Forster : "La malfacileco verki en la angla estas al mi ekstreme enuiga. Ah, Dio mia! se oni povus ĉiam skribi tiun belan lingvon de Francio !". Ĉu lingvo pri kiu Winston Churchill humure diris : "la angla estas la lingvo plej facile fuŝparolebla" ? Ĉu en lingvo pri kiu "Peoples Journal" raportis la 7an de septembro 2006, sub la titolo "Bad English, bad education" (Malbona angla, malbona edukado) : "La plimulto el la studentoj tute ne regas matematikon kaj sciencon pro tio ke ili ne povas kompreni la anglan" ? Ĉu en lingvo tiagrade malklara en aviado, ke necesas limigi la parolajn interŝanĝojn al esprimoj esence tutpretaj, kodigitaj, konvenciaj (31) ? Ĉu en lingvo por kiu fondiĝis, en 1908, asocio por ties simpligo pro la malfacileco ĝin bone legi kaj kompreni kaj pro la kosto, kiu rezultas el tio por la edukbudĝeto : [Spelling Society](#) ?... En Britio mem, apenaŭ efikis multekosta programo de 730 milionoj da eŭroj en dek jaroj por instrui legadon en la angla (32). La ideon pri simpligo de la angla subtenis i.a. Theodore Roosevelt, Mark Twain, Benjamin Franklin, Andrew Carnegie...

Ne mankas manovroj kaj premoj por prepari la publikan opinion al rezigno pri propralingva esprim-ebleco kaj -rajto, al rezigno pri uzo de la propra lingvo, t.e. tiu, kiun ĉiu homo plej bone regas, kaj tio profite al uzo de la angla en kiu la usonanoj, laŭ la esprimo de David Rothkopf, "sentas sin

komforte“. La supre prialudita enketo de BBC, en junio 1998, celis koni la opinion de ĝia aŭskultantaro pri la angla kiel unika oficiala lingvo de Eŭropa Unio : 37% estis kontraŭ kaj 63% por. Notindas la fakto ke samdirektan demandon faris "[Euronews](#)" en aprilo 2009 : "*Ĉu la Eŭropa Parlamento devas forlasi la multlingvismon por unu aŭ du laborlingvoj ?*", senteble por influi la opinion ([rezulto](#) : Jes: 27%, Ne: 71%, Sen opinio: 2%)

En 1999, en la franca semajnmagazino "**Valeurs actuelles**" (Aktualaj valoroj; 2-8 de okt.1999), la ĵurnalistino Catherine Nay rimarkigis pri la Eŭropa Komisiono, ke "*En la kabineto de la dudeko da komisaroj, Anglio havis la plej bonan parton kun ok direktorecaj postenoj, tri kabinetestroj (ekvivalento de la ministeriaj kabinetdirektoroj en Francio) kaj kvin postenoj de adjunktoj. Francio ricevis nur tri. Germanio kvar... (...) La angla fariĝis fakte la oficiala lingvo, ĝi ne plu estas la franca, en realo, ĝia rolo malpliigis, okazis akcelo. Ricardo Levi, la proparolanto de Romano Prodi, esprimiĝas nur en la angla dum li tre bone parolas nian lingvon. Kaj Neil Kinnock, kiu ne parolas ĝin, kontraŭstaris al nomumo de franco por la posteno de adjunkta proparolanto.*" Aldone al la posteno de vic-prezidanto de la Eŭropa Komisiono, [Neil Kinnock](#) fariĝis ĉefrolanto en la Reformo de la Komisiono. Tiel konkretiĝis la intencoj de la brita registaro tra la Brita Konsilio, kies nuna prezidanto estas... Neil Kinnock, tiel ke li povas profitigi ĝin el la spertoj akiritaj en la instancoj de Eŭropa Unio por faciligi pliajn manovrojn de eliminado de la ceteraj lingvoj.

En artikolo de "**Guardian**" (29.11.2001) aperis opinio laŭ kiu "*la plej simpla kaj ŝpariga solvo konsistus uzi nur la anglan lingvon.*" Tio estas tute certa por Britio kaj nur por Britio. Temas eĉ ne nur pri simpla kaj ŝpariga solvo por ĝi, kiu tiel troviĝus en situacio de lingva monopolo, t.e. celo jam grandparte atingita kaj tre enspeziga. Laŭ la [Raporto Grin](#) :

1) la Unuiĝinta Reĝlando nete gajnas minimume 10 miliardojn da eŭroj ĉiujare pro la nuna superrego de la angla; 2) se oni prikonsideras la multiplikan efikon

de certaj komponantoj de tiu sumo, kaj ankaŭ la rendimenton de la kapitaloj, kiujn la anglalingvaj landoj povas investi aliloke pro la privilegiita pozicio de sia lingvo, tiu totalo sumas je 17 ĝis 18 miliardoj da eŭroj jare ; 3) tiu sumo estus certe pli alta se la hegemonio de tiu lingvo plifortiĝus pro prioritato, kiujn koncesius al ĝi aliaj Ŝtatoj, precipe en la kadro de siaj respektivaj edukpolitikoj ;

4) tiu sumo ne enkalkulas la apartajn simbolajn efikojn (kiel la avantaĝo pri kiuj ĝuas la denaskaj parolantoj de la hegemonia lingvo en ĉiu situacio de intertraktado aŭ de konflikto okazanta en ilia lingvo); tamen tiuj simbolaj efikoj havas sendube ankaŭ konsekvencojn materiajn kaj financajn ; (pp 6-7).

El tio rezultas:

1) pozicio de kvazaŭ-monopolo sur la merkatoj de la tradukado kaj interpretado al la angla, de la redaktado de tekstoj en la angla, de la produktado de pedagogia materialo por la instruado de la angla kaj de la instruado de tiu lingvo ;

2) la ŝparo de tempo kaj de mono en la internacia komunikado, la parolantoj nedenaskaj faras la tutan strebadon esprimiĝi en la angla kaj konsentas akcepti mesaĝojn dissenditajn en tiu lingvo;

3) la ŝparo de tempo kaj mono por la anglalingvanoj, pro la fakto ke ili ne plu multe strebas por lerni aliajn lingvojn

4) la rendimento de la investo, en aliaj formoj de homa kapitalo, de la monrimedoj, kiujn la anglalingvanoj ne plu bezonas investi en la lernado de la fremdaj lingvoj ;

5) la superregata pozicio de la angleparolantoj en ĉiu situacio de intertraktado, de konkurenco aŭ de konflikto disvolviĝanta en la angla. (pp 65-66)

Same kiel Margaret Thatcher laŭdegis la usonanglan ekonomikan "*modelon*", la brita ĉefministro Gordon Brown laŭdegis, la 17an de januaro 2008, la anglan en la rolo de mondlingvo kaj anoncis sian intencon disvastigi ĝin tutmonde : "*English - The World's language*" (La angla — la lingvo de la mondo) (33).

Gordon Brown volas fakte vendi sian lingvan modelon al la mondo : *“Mia plano konsistas el tio, ke, dum la dek venontaj jaroj, almenaŭ 1 miliardo da personoj en la vilaĝoj kaj urboj de ĉiu kontinento havu aliron al la rimedoj, al la materialo kaj al la kvalifikiĝoj de la Unuigita Reĝlando.”* Li asertis ke 200 000 plenkreskaj pekinanoj nun lernas la anglan eksterlerneje, kaj li esprimis intencon subteni decidon de la ĉina registaro por ke la angla estu deviga en la ĉinaj lernejoj ekde la aĝo de ses jaroj, kun, komence, 20 milionoj da infanoj. Li kredas ke, ekde 2025, la nombro de la ĉinoj parolantaj la anglan estos pli granda ol tiu de ĝiaj parolantoj en la cetera mondo. Nova programo de Brita Konsilio planas varbadon de “instruistoj-trejnistoj”, kiuj instruos siavice 750 000 instruistojn de la angla en Hindio dum la kvin venontaj jaroj.

La angla lingvo en la rolo de internacia lingvo estas evidenta elemento de superregado profite al la du ĉefaj landoj kun forta koloniisma, imperiisma kaj rabista tradicio, kie ĝi estas la NACIA lingvo. Por Gordon Brown, freŝdate implikita en skandalo de ŝtatrepago de personaj elspezoj (do, fare de la britaj impostpagantoj), la denaske neanglalingva mondo, t.e. pli ol 95% el la homaro (34), estas giganta ekspluatenda naftoputo. Tiun “donacon” li faras ne al la mondo, sed al Britio mem, eĉ pli al Anglio ol al Skotlando aŭ Kimrio, kies aŭtoktonaj loĝantoj malŝategas aŭdi ke ili estas angloj.

La bonedukitaj papagoj de Gordon Brown

Evidente, ie ajn en la mondo, homoj gurdas kaj papage ripetas tion, kion diris Gordon Brown pri la angla, ekzemple ke pli ol miliardo da homoj ĝin parolas, ke ĝi estas la lingvo de la internacia aeronautiko, de la komerco, de la Interreto, de la scienco, ktp., ktp. Tiu rekantaĵo estas ja tre konata en la tuta mondo. Sed Brown memkompreneble prisilentas tre gravan fakton, t.e. ke la angla faras el Anglio privilegiitan lingvan centron; ke estas vehiklo de ideoj kaj influoj el kiu Britio, kaj Usono, plej multe profitas kaj eltiras strategiajn kaj ekonomiajn avantaĝojn; ke ĝi kreas lingvan monopolon, tute konforme

Per la angla, li kreas rilaton de dependeco, li faras el Anglio gravan parton el la “Centro” al kiu denaske alilingvaj homoj de la “Periferio” devas sin turni unue por provi, ne ĉiam sukcese, regi la lingvon, kaj due por akiri sciojn. Tiel la landoj de la “Centro”, kiuj strebas trudi la anglan kiel unikan lingvon en scienco, havas la eblecon logi kaj akapari al si la plej naturdotitajn kaj talentajn diversfakajn homojn el diversaj landoj kaj tiel senigi ĉi lastajn je fortoj esencaj por ilia disvolviĝo.

En la konkludo de sia parolado, Gordon Brown jene difinis la anglan : *“La lingvo, kiu helpas la mondon paroladi, ridi kaj komuniki kune.”* Povas efektive ridi nur denaskaj anglalingvanoj, kiam ili evitas al si kroman pezan multekostan ŝarĝon kaj konstatas ke la alilingvaj popoloj akceptas ŝafece kaj obeeme forzi liberan tempon, fortojn kaj monon por lerni lingvon, kiu metas ties lernantojn en staton de malsupereco kaj dependeco rilate al la “Centro”. Ili povas ridi, kiam ili povas laŭvole fari tion, kio plej plaĉas al ili, tion kio aspektas al ili plej utila kaj profitodona. La profito kaj motivo por ridegi estas por la “Centro”. La kroma strebo, penado, zorgoj kaj foroferoj estas por la “Periferio”, t.e. pli ol 95% el la homaro. Detalan analizon pri la procezo de "ridema" superrego de la mondo liveras profesoro Robert Phillipson en [“The linguistic imperialism of neoliberal empire”](#).

al la linio fiksita en la Raporto pri la angla-usona konferenco de Kembriĝo en 1961 : *“La raporto proklamas ke la Centro havas monopolon de lingvo, kulturo kaj kompetenteco, kaj ne devus toleri reziston kontraŭ la regulo de la angla”* (35). Por Brown, la angla estas esenca rimedo de superrego. Angloj, usonanoj kaj aliaj anglalingvaj popoloj ne havas emon lerni du lingvojn dum sufiĉas al ili unu sola : ilia propra, kiu ne postulas de ili kroman laboron, tempoperdon, monelspezon, rezignon pri aliaj interesaj aktivajoj pro tio, ke tiom da homoj pretas en la tuta neanglalingva mondo, ŝafe,

rezignacie kaj fatalisme foroferi tion.

Koloniaj kaj imperiismaj potencoj iam lernigis siajn lingvojn al la "elito" de la teritorioj, kiujn ili volis kolonii, aŭ de landoj, kiujn ili volis transformi en satelitojn. Iama profesoro pri la angla kaj pri la okcitana kulturo, la franca esejisto [Claude Duneton](#) diris pri lingva politiko, en intervjuo kun la popularscienca magazino "[Ça m'intéresse](#)" (Tio interesas min, februaro 2000) : "*Same kiel ĉiam, en la angligo de Francio ekkunlaboras la elitoj*". Pri tiu sinteno Gandhi iam esprimis saman opinion : "*Hindion pli sklavigis niaj scipovantoj de la angla ol la angloj*" (36). Tio konfirmiĝis i.a. en 2001, okaze de la regantara kunveno de Monda Organizo pri Komerco ([MOK](#)) en Seattle. En artikolo de "[Le Monde](#)" (4an de decembro 2001), ties speciala sendita reportero skribis, ke tiu mondorganizo havas tri laborlingvojn, sed ke fakte unu el ili estas "*pli egala ol la ceteraj*" : la angla, kiun uzis la Eŭropa Komisararo [Pascal Lamy](#) (franco ! laŭreato 2003 de la Akademio de la Carpette Anglaise) dum tiu kunveno en parolado por kiu ne ekzistis franclingva versio.

La papagoj de Brown asertas ke neniu devigas iun ajn lerni la anglan per minaco, perforte, kun revolvero direktita al tempio. Sed same ekzistas landoj, kie voĉdonebleco estas ebla por ununura kandidato al prezidenteco. Civitanoj similas al gregoj, kiujn oni pelas inter retoj en formo de funelo por foje buĉocele kapti ilin. Ekzistas pli subtilaj rimedoj por devigi homojn flankenlasi emojn kaj preferojn, fari ion, kion ili ne emas fari.

Ofte aŭdebla aŭ legebla estas opinio laŭ kiu neniu estas perforte devigata lerni kaj praktiki la anglan, laŭ kiu ne ekzistas altrudo en tiu direkto. Sed, aliflanke, lernantoj kaj ties gepatroj sentas, ke tio estas tiagrade necesa ke tio estas finfine deviga; bona sciencisto aŭ esploristo ne reganta la anglan ĝuas malpli grandan atenton kaj konsideron ol subnululo ĝin reganta. La celo de la Konferenco de 1961 estas grandparte atingita : ĝi trudis novajn mensajn strukturojn kaj tiel metis la plejparton el la homaro antaŭ situacio de plenumita fakto.

La devigo, por la neanglalingvaj sciencistoj, redakti siajn laboraĵojn en la angla, faciligas ties rabadon, piratadon. Detala analizo pri la negativaj aspektoj de la nurangla lingva politiko estas trovebla en verkoj de Charles-Xavier Durand, aŭtoro de "[La mise en place des monopoles du savoir](#)" (La starigo de la monopoloj pri scio; eld. L'Harmattan, Parizo. 2002, reeldonota), "[La nouvelle guerre contre l'intelligence](#)" (La nova milito kontraŭ la inteligenteco; eld. François Xavier de Guibert. Parizo. Tri volumoj, 2002-2003) kaj de interretaj dokumentoj kiel "[Les absurdités des politiques linguistiques européennes](#)" ([La absurdaĵoj de la lingvaj politikoj en Eŭropo](#)).

Tiun fakton bone ilustras artikolo titolita "La défense de la science en français" (La defendo de la scienco en la franca) publikigita en "[Le Monde](#)" de la 25a de marto 1992. La ĵurnalisto [Jean-Pierre Péroncel-Hugoz](#) (JPPH) menciis la ekziston, inter multaj kazoj, de grava problemo, kiun spertis Claude Roux, doktoro pri sciencoj, agregaciulo pri biologio, internacie fama likenologo. En 1990 kaj 1991, Claude Roux kandidatiĝis por posteno de duaklasa direktoro de esploroj en CNRS (Centre National de la Recherche Scientifique / Nacia Centro pri Scienca Esplorado). Malgraŭ tre bona dosiero kaj favora opinio, li ricevis negativan respondon : "*Via dosiero estas tre bona, sed vi tute ne havis ŝancon esti akceptita ĉar vi ne publikigis en la angla.*" La direktoro de la laboratorio, kie tiam laboris Claude Roux, telefonis al la ministrino ([Catherine Tasca](#), [nun deputitino](#)) de la francparolantaro, kiu montris sin nekredema pri tiu afero. Laŭ diversaj fontoj, Claude Roux eksciis, ke en la takso de la publikaĵoj de kandidatoj, CNRS baziĝas precipe sur "[Citation Index](#)" (Indekso de citaĵoj) kaj "[World Translation Index](#)" (Indekso de la tutmondaj tradukoj), du usonaj referencaj privataj datumbankoj "*praktike recenzantaj nur anglalingvajn publikaĵojn*". JPPH aldonis : "*Sammaniere kiel aliaj francaj specialistoj el diversaj fakoj, kiuj suferis saman disreviĝon kiel S-ro Roux, oni povas pensi ke ĉi lasta, se li volas sian promocion, publikigos ekde nun en la angla. Tiel, al la senvalorigo de la franca, lingvo de la scienco, aldoniĝas iom post iom neagnoskita*

diskriminacio — kaj eĉ ofte malkonfirmita fare de la administracio — kiu pli kaj pli sankcias uzantojn de la franca lingvo, en Francio kaj ekster Francio.“ [Claude Roux](#) neniam rifuzis uzi la anglan kiam tio estis necesa, i.a. kiam li akceptis eksterlandajn kolegojn en sia laboratorio. Tamen li havis la kuraĝon plue kaj obstine rezisti al tiu diktatoreca premo tiel ke li finfine sukcesis esti nomumita esplordirektoro sen publikigo en la angla, danke al esploroj en "**Citation Index**", kiuj montris, ke liaj francaj kaj esperantaj publikaĵoj estis multe cititaj, al lavango da artikoloj pri la afero en diversnaciaj ĵurnaloj kaj al interveno de kanada asocio de defendo de la uzo de la franca lingvo. La artikolo de JPPH ne mencias ke li redaktis kaj publikigis kun Georges Clauzade, en 1985, imponan referencan verkon en Esperanto : “**Likenoj de Okcidenta Eŭropo**“ (37). Li estas membro de la [Internacia Akademio de Sciencoj de San Marino](#), kies ĉefa laborlingvo estas Esperanto kaj kunordiganto de la partoj *Matematiko, natursciencoj kaj teknikoj* de "**Plena Ilustrita**

Vortaro de Esperanto" ([PIV](#)) 2002 kaj 2005.

En sia libro “**Irak in translation — De l'art de faire la guerre sans parler la langue de son adversaire**“ (Irako en tradukado — Pri la arto perdi militon sen scipovi la lingvon de sia kontraŭstaranto), Mathieu Guidère skribis : “*Tute evidente, la lingvoj ne ĝuas je granda intereso en superpotenco, kiu faris el la angla la mondscale ĉefan lingvon, kaj endis kontentiĝi per tio*“ (p. 81) kaj ke, laŭ alta respondeculo de CIA, lernado de la araba ne estas tiel facila : “*Estas pli facile instrui piloton de ĉasaviadilo ol korekte paroli la araban*“ (p. 118). (38). Alidirite : la profito por la denaska anglalingvanaro, la kroma strebo, penado kaj handikapo por la denaska neanglalingvanaro. Usono kaj Britio efektive seninteresiĝas pri lingvolernado. Sed Obama tamen konscias nun ke nura scipovo de la angla ne plu sufiĉas. En Dayton, Ohio, li konfesis la 11an de julio 2008 : “*Mi ne parolas fremdan lingvon. Tio estas embarasa.*“ (39). Li opinias ke lernado de almenaŭ unu fremda lingvo fariĝas neceso.

Senpagaj staĝoj de la angla : kiom kostas koloniigi sin ?

Pro komplekso de malsupereco kaŭze de sia nivelo en la angla, kiu, same kiel tiu de Sarkozy (40), amuzas iujn humoristojn, la franca ministro de Nacia Edukado, Xavier Darcos, fariĝas kunkulpulo en vera koloniado de Francio. Li iniciatis organizadon de staĝoj laŭdire [senpagaj](#) por la liceanoj. Ja, sed certe estas iu, kiu, finfine, pagas tiun fuŝaĵon : la impostpaganto (41). Kaj tio por nur unu el la [38 agnoskataj versioj de la angla](#). Kiom kostas al la franca popolo koloniigi sin ? Estas dezirinde ke ĵurnalistoj pritraktu tiun demandon ankaŭ en la ceteraj neanglalingvaj landoj.

Anglaj instruistoj venas en Francion — certe ne senpage —, sed ne estas reciprokeco. Kiam oni postulos ke por unu angla instruisto en Francio aŭ en alia lando de EU, estos unu instruisto de Francio aŭ de alia lando de EU en Britio ? Tiam estos finfine eble paroli pri justa kaj ekvilibra konstruado de Eŭropa

Unio. En la nuna kazo, ne temas pri unio, sed pri estriĝo, kun komplaceco (kunkulpeco) je plej alta nivelo, de Eŭropa Unio fare de unu el la ŝtatoj-membroj, kies loĝantaro reprezentas nur ĉirkaŭ 12% el tiu de la unio. Ĉu tio estas demokratio, kiam nur unu el la partneroj profitas centprocente el la rimedoj de la privilegiita lingvo ? La akademiano, filozofo kaj historiisto pri scienco [Michel Serres](#) diris diversokaze, i.a. en “**Le Nouveau Quotidien**” (Lausanne, Svisio, 1.12.1992) : “*Nuntempe, la sciencistoj, la publicistoj, la ĵurnalistoj parolas angle. Oni vidas sur la muroj de Parizo multe pli da anglaj vortoj ol oni vidis da germanaj dum la Okupacio.*“ Ne nur sur la muroj de Parizo : en ĉiuj lernejoj de Francio. Dum la Okupacio de Francio fare de de la hitlera reĝimo, eĉ la plej aĉaj kunlaborantoj ne antaŭenpuŝis tiagrade la lernadon de la germana.

La ministerio de Edukado ne prikonsideris la

raporton, kiun ĝi mendis al [François Grin](#), profesoro ĉe la Universitato de Ĝenevo, kaj kiu estis publikigita en 2005 sub la titolo "[L'enseignement des langues étrangères comme politique publique](#)" (La instruado de fremdaj lingvoj kiel publika politiko — (42). Tiu raporto, kiu proponis aliajn vojojn, estas kulpatesta por la nurangla politiko al kiu blinde puŝas la nuna ministro Xavier Darcos por kiu la vorto "lingvoj", plurale, estas tre singulara : "English only" (**rimarko** : en la franca, la vorto "singulier" povas signifi "singulara" aŭ "strangeta"). En 2007, okaze de vizito al la lernejo Willy Brandt, en Éliancourt, Xavier Darcos esprimis intencon, laŭ la deziro de prezidento Sarkozy, fari el Francio "[dulingvan landon](#)". Temas evidente pri dulingvismo franca-angla. Materialaj, financaj kaj homaj rimedoj estis tiucele malavare disponigataj.

Multaj estas la dunganoncoj por funkcioj de alta respondeco kaj decido, do, influaj, por kiuj estas postulata denaska scipovo de la angla : "*English mother tongue only*" (43, 44). Tio signifas postenojn por kiuj eĉ iu Darcos ne taŭgas. Respektive Prezidanto Ĝenerala Direktoro de Renault kaj de Sanofi-Aventis, Louis Schweitzer kaj Jean-François Dehecq elreviĝis pri la nurangla komunikado en multnaciaj entreprenoj. Tamen, kvazaŭ necesus privilegii la privilegiitojn de la komunikado, eĉ la NRO Emmaüs International eniris tiun kuradon al diskriminado kaj submetiĝo (**rimarko** : la kebeka verkistino [Denise Bombardier](#) uzas la esprimon "à-plat-ventrisme", kiu pensigas pri

ismo ventrokuŝa, rampa) al funde maljusta ekonomia ordo flankenĵetanta la malfortulojn per anonco por dungo de denaska instruisto de la angla (45).

La angla estas tute same katastrofa sur la propedeŭtika tereno, t.e. kiel prepara instruado. Tio estas kontraŭpedagogio. Male al iuj asertoj, aliro al konvena nivelo en tiu lingvo estas malfacila. Eĉ [Claude Hagège](#) agnoskas tion. Charles Dickens plendis pri ĝi. Plej granda estas la risko je [disleksio](#) por anglalingvanoj. En Eŭropo, la anglaj infanoj estas la plej lastaj en legkapablo. La [Simplified Spelling Society](#) rekomendas ĝian simpligon. Sed la problemo pri justeco ne estus pro tio solvita. La instruado de la angla ekster la anglalingvaj landoj konsumas tiom da homaj fortoj kaj financaj rimedoj ke ne restas sufiĉe por pli ekvilibra edukado. Ekzemple, preskaŭ kvarono el la 15-jaraj eŭropanoj havas malbonan legkapablon <http://appy.ecole.free.fr/articles/20080722a.htm> ("Le Figaro" 22.07.2008, Marie-Estelle Pesch).

La angla estas, unue, NACIA lingvo. Ĝi efikas kiel lingva "*Apartheid*" (apartismo) : la lingvo estas kiel la haŭtkoloro kiun oni havas jam denaske. Ni memoru pri la malestima esprimo "*Speak White!*" (= parolu blanke !), samvalora kiel pritrakti iun kiel "négro" (**rimarko** : négro = negro, nigrulo, havas foje pejorativan, malestimatan valoron en la franca). La lingva diskriminacio tute same ekzistas kiel la rasa diskriminacio. Ambaŭ estas tute same kondamnindaj.

Pretendo je "Manifest Destiny"

Ekspansiemaj nacioj ne malofte trovis religian komplacecon por akapari al si teritoriojn, prirabi ties riĉaĵojn, laŭdire "civilizi" ties loĝantojn, sklave ekspluati ilin, promesante al ili postmortan paradizon. Koloniismo havis siajn apostolojn. Eĉ se estis esceptoj, la surtera vivo de tiuj loĝantaroj ofte transformiĝis de tiam en inferon. En 1803, brita misiisto skribis, en rakonto pri la insulo Cejlono (nun [Sri-Lanko](#)) : "*fervora peno fare*

de nia registaro enkonduki nian lernadon kaj nian religion inter la indiĝenoj estas la plej certa rimedo por plibonigi kaj firmigi nian imperion en la insulo".

Britio estigis la Unuan Opian Militon (de 1839 ĝis 1842) en Ĉinio. Britio kaj Francio alianciĝis en la Dua (1856 ĝis 1860) en kiu partoprenis ankaŭ Usono. Rusio kaptis la okazon por invadi ĉinajn teritoriojn. En 1849,

inter tiuj du militoj, kiuj jam montris la veran "civilizan" vizaĝon de okcidentaj potencoj, jam legebla estis jena laŭdego pri la angla : "Nia lingvo estas tiu de la scienco kaj arto, de la komerco, de la civilizacio kaj de la religia libereco. Ĝi estas abundokorno [simbolo de abundo], al la nacio, kiu alprenas ĝin, ĝi alportas la civilizon kaj la kristanisman. Ĝi jam estas la lingvo de la Biblio kaj ni povas antaŭvidi ke ĝi rapide fariĝos la lingvo de internacia komunikado." (46). Pliaj rabistaj militekspedicioj de Britio okazis poste kun Francio, kiu strebis siaflanke akapari al si pli sudajn teritoriojn, i.a. Tonkinon kaj Anamon (nun partoj en Vjetnamio) .


La esprimo "[Manifest destiny](#)" (evidenta destino) aperis unuafoje en julio-aŭgusto 1845 en "[United States Magazine and Democratic Review](#)" sub la plumo de ties nov-jorka ĉefredaktoro [John O'Sullivan](#), kiam plifortiĝis ekspansiisma premo por la aneksado de Teksaso. Pravigocele, li pretendis ke Usono ricevis de dia providenco civilizan mandaton.

En 1885, sub la titolo "[Manifest destiny](#)", filozofo kaj historiisto pri Usono, [John Fiske](#), aperigis libron en kiu li subtenis la ideon, ke Dio taskis Usonon je misio civilizi la mondon ! Li kredis je la rasa supereco anglosaksa kiel produkto de natura selektado, substrekante ke usonanoj kaj angloj jam konkeris trionon el la terglobo kaj antaŭenigis la progreson sub formo de kapitalismo kaj demokratio.

La emon konsideri sin kiel popolo elektita de Dio kultivis en Usono la blankhaŭtaj anglosaksaj protestantoj ("White Anglo-Saxon Protestants" — WASP). Ankaŭ en 1885, en "[Our country: Its Possible Future and Its Present Crisis](#)" (Nia lando : pri eblaj futuroj kaj ĝia nuna krizo) (47), la protestanta pastro [Josiah Strong](#) skribis "Estas evidente ke la anglosaksoj tenas en siaj manoj la destinon de la homaro" kaj ke "Usono fariĝos la ĉefa sidejo de tiu regpovo". Apologiisto de imperiismo, li propagandis pri la supereco de la anglosaksa raso kaj por ke Usono civilizu kaj kristanigu la mondon : "Evidente, ĉefe al la angloj kaj al la popoloj de Ameriko ni devas nin turni por evangelizi la mondon."

Tamen li miskalkulis pri demografia evoluo de la mondo : "Kaj eblas ke, de nun ĝis la fino de la venonta jarcento, la anglo-saksoj estos pli nombraj ol ĉiuj aliaj civilizitaj rasoj de la mondo". (48)

Forte influas ankoraŭ nun la politikon de Usono tiuj sintenoj, la principo ke ĉio estas ekspluetebla, inkluzive la nomon de Dio, la profitocela devojigo de la evangelia mesaĝo trovebla en la devizo de la lando kaj ties bankbiletoj : "In God We Trust" (Je Dio ni kredas), kaj en ties himno "[God Bless America](#)" (Dio benu Amerikon, t.e. Usonon). Tio estis konstatebla, kiam G. W. Bush, post forlaso de alkoholismo profite al kristanismo, transiris al alia formo de ebriiĝo kaj dufoje sukcesis en balotoj por prezidenteco de "civilizita" lando.



Admiranto de Jesuo Kristo sed unue mon-kredanto kaj -adoranto

Ankaŭ dum la enoficiĝo de Barak Obama, la 20an de januaro 2009, religiaj referencoj estis ĉiumomente rimarkeblaj, eĉ pezaj. Tamen, Usono, aŭ, pli ĝuste ties registaroj, ja ne havis ekskluzivecon aŭ monopolon pri hipokrita kaj cinika misuzo de la nomo de Dio. Bone konata estas la esprimo "[Gott mit uns !](#)". Al tio [Jean Bacon](#) dediĉis tutan ĉapitron el "[Les Saigneurs de la guerre](#)" sub la titolo "Les dieux casqués" (La kaskitaj dioj).

En 1887, en Usono, la leĝo [Dawes Severalty Act](#) (aŭ General Allotment Act) konsistigis provon asimili la indianojn al la usona socio, sed ĝi estis fakte rimedo por senposedigi ilin je plej valora grundo.

Ĝuste la saman jaron, en Varsovio, post longa laboro kaj serĉado, D-ro [Ludwik Lejzer Zamenhof](#) finfine trovis eldoniston kaj financajn rimedojn por publikigi, la 26an de julio, lernolibron de lingvo internacia, pli precize sennacieca, ne ligita al la influo de ŝtata, politika, religia aŭ financa potenco, do, tiurilate neŭtrala. Tiun lingvon li deziris proponi al la homaro por kontribui per ĝi al ĝia emancipiĝo kaj liberiĝo. Ĝi aperis sub la titolo "**Internacia Lingvo**" kaj sub la aŭtora pseŭdonomo "Doktoro Esperanto".

En 1895, la usona historiisto [Brooks Adams](#) pravigis barbarecon en "The Law of Civilization and Decay" (La leĝo de la civilizo kaj la finiĝo) pro tio ke ĝi estis necesa por disvolvi imperiojn kaj submeti koloniojn. Li antaŭvidis anglosaksan aliancon inter Usono kaj Britio por superregi la mondon (49). La saman jaron, cara malpermeso trafis Esperanton sur la tuta teritorio de Rusio.

Usona prezidento de 1892 ĝis 1901, metodisto, [William McKinley](#) asertis ke li petis konsilojn de Dio pri milito en Filipinoj, kiu daŭris de 1899 ĝis 1913. Same faros, preskaŭ jarcenton poste, en 2003, George W. Bush, ankaŭ metodisto, por ataki Irakon. En 1901, dum la milito de Filipinoj, la posta prezidento Theodore Roosevelt aplikis rasistajn teoriojn por subpremi tiean ribelon. En kvarvoluma libro titolita "**The Winning of the West**" (1889-1896 — La venkinto de Okcidento), li pravigis la masakron de centoj da ĉejenaj virinoj kaj infanoj en Sand Creek, en 1864, kaj la ekstermadon de usonaj indianoj por antaŭenigi la "civilizadon". Pri nigruloj li skribis en 1906 en [letero al Owen Wister](#) "Mi tute konsentas kun vi por diri, ke kiel raso kaj entute, ili [la nigruloj] estas tute malsuperaj al la blankuloj" (50). Kiam Hispanio vendis Filipinojn al Usono, la nova koloniista potenco siavice strebis trudi sian lingvon.

La 9an de januaro 1900, [Albert Beveridge](#), senatano de Indianao, jene pravigis la militon de Filipinoj : "*Filipinoj apartenas al ni por ĉiam. [...] Je mallonga distanco de Filipinoj troviĝas la neelĉerpeblaj ĉinaj merkatoj. Ni ne eliros el tiu regiono. [...] Ni ne rezignos*

ludi nian rolon en la civiliza misio rilate al la mondo, kiun Dio mem konfidis al nia raso. Pacifiko estas nia oceano. [...] Kien ni devas turni nin por trovi konsumantojn por nia troaj produktaĵoj ? Geografio respondas al tiu demando. Ĉinio estas nia natura kliento. [...] Filipinoj havigas al ni bazon je la pordoj de tuta Oriento." En la sama parolado de la 9a de januaro 1900, li diris pri Dio : "*Dio ne preparis la anglalingvajn kaj teŭtonajn popolojn dum jarmilo nur por vana kaj bagatela memkontemplado kaj memadmira. Ne ! Li faris el ni la mastrojn organizantojn de la mondo por starigi sistemon tie, kie regas ĥaoso. Li naturdotis nin por regi tiel ke ni havigu registaron al la sovaĝaj kaj senilaj popoloj. Sen tia forto, la mondo refalus en barbarecon. (51) "* La sama senatano jam diris en 1894 : "*Ĉar la grundo produktas multe pli ol ni bezonas, nia destino estas proprigi al ni la tutmondan komercon*". En parolado de la 16a de septembro 1898, sub la titolo "[The March of the Flag](#)" (La marŝo de la flago), en kiu li ofte referencis al Dio kaj al la Providenco por pravigi imperiismon, li demandis "*Ĉu la usona popolo daŭrigu sian marŝon al komerca superregado de la mondo ?*". Evidente, la respondo estis por li jesa. Li pretendis ke "*La komerca supereco de la Respubliko signifas ke ĉi tiu lando estos la suverena faktoro en la paco de la mondo*", sed, fakte, en la tuta historio de la homaro, neniu alia nacio dissemis tiom multe da [militoj tra la mondo](#), nemalofte por subteni koruptitajn kaj diktatorajn reĝimojn.

Tian senĝenan politikon povis ankoraŭ observi jardekojn poste, i.a. en Tuleo, en 1951, la franca etnologo, fakulo pri inuitoj, geografo, verkisto [Jean Malaurie](#). Dudek jarojn poste, en 1971, Britio disponigis al Usono la insulon [Diego Garcia](#), en Hindia Oceano, por instali komunan imponan strategian militbazon. Britio deportis la tutan indiĝenan loĝantaron por sekurecigi tiun bazon kaj malpermesis ĉiun ekonomian aktivadon sur la insulo. Tio ilustras opinion, kiun poste esprimis, en 1997, David Rothkopf, laŭ kiu, ie ajn kaj en iu ajn cirkonstanco, "*usonanoj sentu sin komforte*"...

En 1904, Theodore Roosevelt opiniis, ke

apartenas al "Ameriko" (Usono) *“plenumi povon de internacia polico”*. La 12an de oktobro 1915, li skribis : *“Ni havas unu solan flagon. Ni devas enkaŭ lerni unu solan lingvon, kaj tiu lingvo estas la angla.”* (52) kaj, la 3an de januaro 1919 : *“Ni havas ĉi tie lokon nur por unu lingvo, kaj ĝi estas la angla lingvo, ĉar ni volas vidi la kunfandujon [hommiksujon] transformi la loĝantaron en usonanojn, kun usona nacieco, kaj ne en loĝantojn de poliglota gastejo.”* (53)

Tamen, estas notinde ke Theodore Roosevelt estis tre malbona en ortografio de la angla tiel ke, en aŭgusto 1906, li taskis la Registaran Presejan Oficejon (Government Printing Office) simpligi la ortografion en ĉiuj publikaĵoj de la Ŝtatepartemento por *“fari nian literumon iom malpli stulta kaj fantasta”* (54). La gazetaro primokis tiun decidon tiel ke li finfine rezignis pri ĝi. La saman jaron, kvankam kontraŭanto de imperiismo, Andrew Carnegie esprimis konvinkon ke la angla povus esti universala lingvo en la tuta mondo se estus nur pli facile ĝin legi kaj skribi. Li starigis grupon da intelektuloj por pritrakti tiun aferon (55). Ankaŭ oponento al imperiismo, [Mark Twain](#) forte subtenis tiun proponon (56).

Ekde la Traktato de Versajlo, subskribita la 28an de junio 1919, la angla fariĝis egalrajta kun la franca kaj iom post iom same valida en la rolo de diplomacia lingvo ĝis kompleta renversigo de la situacio. Jam en 1899, dudek jarojn pli frue, [Paul Chappelier](#) proponis sistemon, kiun li nomis “Bilingua. Malamiko de Esperanto, li sugestis kaj la anglan kaj la francan en la rolo de internacia lingvo (singulare !) kaj imagis lingvan traktaton inter Usono, Britio kaj Francio laŭ kiu la angla kaj la franca fariĝos internaciaj lingvoj en tiuj landoj kaj ke la civitanoj de aliaj landoj estos tiel devigataj, propraintereze, lerni la du *“civilizajn lingvojn”* aŭ almenaŭ unu el ambaŭ ! Li estis el tiuj francaj naivuloj, kiuj imagis reciprokecon en strebo lerni alies lingvon : anglalingvanoj lernos la francan, franclingvanoj la anglan. Li kredis ke la mondo akceptos tiun "dulingvismon" sen pensi ke ĝi estus fakte, minimume, trilingvismo por la ceteraj popoloj.

Jam en 1921, en Usono, la Konsilio pri la Eksterlandaj Aferoj (Council on Foreign Relations — [CFR](#)) tre favoris al tutmondiĝo, al tutmonda registaro. Dudek jarojn poste, Hitler diris, komence de 1941, ke la germana estos la lingvo de Eŭropo post cent jaroj. En majo 1942, li esprimis la esperon repuŝi la ĉeĥan al la signifo de dialekto en dudek jaroj (Ulrich Lins : *“La danĝera lingvo”*, p. 127). Estis memkomprenebla afero, por la usona registaro, ke tiu mondregado devos esti la afero de Usono mem. Naciaj kaj regionaj lingvoj estis konsiderataj, pro ligiteco kun naciismoj, kiel nedezirindaj, danĝeraj kaj arkaaj (57). En lando, kie la naciismo estas tiel forte flegata — sufiĉas legi aŭ aŭskulti paroladojn de gvidantoj por konvinkiĝi pri tio — ne povas esti pli bona naciismo ol... la usona : USA über alles !

Ekde la fino de 1921, en la sidejo de la Ligo de Nacioj, en Ĝenevo, dekunu nacioj — Belgio, Brazilo, Ĉeĥoslovakio, Ĉilio, Ĉinio, Haitio, Hindio, Italio, Kolombio, Persio kaj Sudafriko — subtenis projekton de rezolucio, kiu esprimis jam tiutempe atentigon pri la lingvaj malfacilaĵoj *“kiuj malhelpas rektajn rilatojn inter la popoloj”*, kaj deziron ke *“la ĉiulandaj geknaboj sciu de nun almenaŭ du lingvojn, sian gepatran kaj facilan rimedon por internacia komunikado”*. Plej akre kontraŭstaris tiun proponon la franca registaro. Ĝi vidis en Esperanto plian danĝeron kontraŭ la pozicio de la franca dum ĝi venis de la angla. Tiu timo ne forigis la veran minacon. La 3an de junio 1922, la ministro de publika instruado Léon Bérard malpermesis uzon de lernejoj ĉambroj por instruado de Esperanto. La samon faris en Germanio, en la sekvanta jardeko, la nazia ministro de edukado. Dum la Okupacio, tiu sama Bérard estis ambasadoro de la registaro de Pétain, kiu kunlaboris kun la nazioj, en Vatikano. Paradoxse, plej elokvente defendis Esperanton... la brita delegito, [Lord Robert Cecil](#), kiu adomnis la Komisionon pri Intelekta Kunlaboro de la Ligo de Nacioj *“memori, ke mondlingvo ne estas bezonata nur de intelektuloj, sed antaŭ ĉio de la popoloj mem”*.

En 1951, Jean-Marie Bressand fondis la

asocion “Le monde bilingue“. Multaj influaj francaj politikistoj subtenis ĝin. Ĝi tute ne malhelpis la devojiĝon al nurangla lingvopolitiko. Le Monde bilingue estis tre malfavora al Esperanto. La angla plue flankenpuŝis la francan el la rolo de diplomatia lingvo kaj en tio ludis gravan rolon la franca servutema “elito“ mem. Bressand ligiĝis junaĝe al la ekstremdekstra organizaĵo “Jeunesses Patriotes“ (Patriotaj junularoj). Li partoprenis en la hispana milito por subteni la reĝimon de Franko. Post reveno al Francio, li estis oficiala ŝoforo de germanaj oficiroj. Ekzistas malkonsento kaj kontestado pri lia pasinteco de rezistanto kontraŭ la nazia Okupacio (58).

Pri la “civiliza rolo“ de Usono kaj la “dia providenco“, kiu gvidas tiun nacion, ekzistas atestoj pli konformaj al la realo, i.a. la libroj “**War is a racket**“ (Milito estas trudŝtelo) de la tre fama usona generalo [Smedley Butler](#) (59), aŭ “**Killing Hope : U.S. Military and CIA Interventions Since World War II**“ (La usona armeo kaj la intervenoj de CIA depost la Dua Mondmilito) kaj “**Rogue States**“ (Kanajla ŝtato) de [William Blum](#) (60) kaj multaj aliaj. Temas efektive pri kanajlokratio. Albert Einstein, kiu fuĝis la nazian barbarecon, skribis : “*Usono formas landon, kiu rekte transiris de barbareco al dekadenco sen iam ajn estis koninta la civilizon.*“ Konfirmiĝis jenaj vortoj de la brita historiisto kaj politikisto [Lord Acton](#) (1834-1902) : “*Memoru ke, tie, kie vi havas koncentradon de povo en malmulte da manoj, ofte homoj kun gangstera mensostato kaptas la regadon.*“ (61)

Jardekojn poste, la 17an de januaro 1961, en parolado de fino de mandato, kelkajn monatojn antaŭ ol la registaroj de Usono kaj Britio interkonsentis pri altrudo de la angla al la mondo, prezidento Eisenhower atentigis pri la reala minaco pri kiu esprimiĝis Lord Acton : “*En niaj politikaj organoj, ni devas zorgi, ke la milita-industria komplekso ne akiru, intence aŭ ne, nepravigeblan influon. La risko, ke katastrofo koncentriĝu potenco en danĝeraj manoj, ekzistas kaj plu daŭros. Neniam ni lasu la pezon de tiu kombinaĵo endanĝerigi niajn liberecojn kaj demokratiajn*

manierojn procedi. Ni rigardu nenion per si mem akceptebla sen ĝisfunda konsidero. Nur vigle atenta kaj konscia civitanaro povas trudi al la giganta industria-milita maŝinaro, kiun ni kreis por prizorgi nian defendon, ke ĝi harmonie enplektu sin en niajn pacemajn metodojn kaj celojn, tiel ke sekureco kaj libereco povu kune prosperi.“

Pli grandan rolon ludis potencaj usonaj firmaoj (Boeing, Lockheed-Martin, Halliburton k.a.) en la decido pri milito de 2003 en Irako ol la laŭdiraj konsiloj de Dio al G. W. Bush, kiu tamen sukcesis mistifiki plimulton el la usona civitanaro. Alimaniere ilustras kaj atestas tiun arogantecon kaj formon de diktaturo, ekonomia, la [dokumentara filmo](#) kaj [libro](#) “**Le monde selon Monsanto**“ (La mondo laŭ Monsanto) de Marie-Monique Robin (62), la katastrofo de [Bopalo](#) kaj multaj aliaj faktoj. Laŭ informo de la radiostacio [Europe 1](#), nur kelkajn monatojn post enoficiĝo de Barack Obama kiel prezidento de Usono, lia kuraĝa edzino Michelle ricevis premajn protestojn de MACA, asocio de famaj agrokemiaj Nordamerikaj entreprenoj kaj firmaoj, inter kiuj Monsanto, pro tio ke, per kreo de biologia, senkemia ĝardeno en la ĉirkaŭaĵo de la Blanka Domo, ŝi donas pri “konvencia“ agrikulturo negativan bildon. Aparte interesa kaj instrua estas unu el la motivoj por influi ŝin : “*Se la usonanoj devus ankoraŭ mem kultivi la ĉefe necesajn produktojn por provizi siajn familiajn bezonojn, ĉu Usono estus ĉefrolanto sur la terenoj de scienco, komunikado, edukado (tiel), medicino, transportoj kaj arto ?*“

Dum mitingo de la [Bildenberg-Grupo](#), okazinta de la 6a ĝis la 9a de junio 1991 en Baden-Baden (Germanio), en kiu partoprenis i.a. Bill Clinton (baptisto, prezidento ekde 1993, [listo de la partoprenintoj](#)), David Rockefeller diris : “*Ni estas dankemaj al Washington Post, al New York Times, al Time Magazine kaj aliaj grandaj publikaĵoj, kies direktoroj ĉeestis en nia kunvenoj kaj respektis la promesojn de diskreteco dum preskaŭ kvardek jaroj. Estintus al ni neeble disvolvi nin projekton por la mondo se ni estus montritaj en plena lumo de la reklamo*

dum tiuj jaroj. Sed la mondo estas nun pli rafinita kaj preta evolui al mondregistaro... La supernacia suvereneco de intelekta elito kaj de tutmondaj bankistoj estas certe preferinda al la nacia memdecido, kiun oni praktikis dum la pasintaj jarcentoj...” (63)

Influaĵaj anglalingvaj amasinformiloj, oficialaj kaj privataj, tiel praktikis dum jardekoj — kaj plue praktikas — politikon de mesongoj kaj informmanipulado kaj tiel partoprenis en mensmanipulado. Sed ne temas pri io nova. Kompreneble, por tia projekto de superrego kaj trudo de unika vid- kaj pens-maniero, esenca estis la altrudo de unika lingvo, kiu evitis kroman konsiderindan penadon al la rektaj profitantoj kaj lasis ĝin al la ceteraj. Kvankam varias informoj pri la usona ĵurnalisto John Swinton (1829-1901) kaj la jaro kiam li esprimis jenan severan opinion pri la libereco de la gazetaro en Usono (1853, 1880 kaj eĉ 1953, do, postmorte !), ĝi plue validas : *“Ne ekzistas ĝis la nuna tago, en Usono, gazetaro libera kaj sendependa. Tion vi scias same bone kiel mi. Neniu el vi aŭdacas skribi siajn honestajn opiniojn kaj vi tre bone scias ke se tion vi faras, ili ne estos publikigitaj. Oni pagas al mi salajron por ke mi ne publikigu miajn opiniojn, kaj ni ĉiuj scias ke se tion ni farus, ni tuj troviĝus surstrate [= sen laboro]. La laboro de ĵurnalisto estas la detruo de la vero, la mensogo evidenta, la perversigo de la faktoj kaj la opinimanipulado serve al la Monpotencoj. Ni estas la obeemaj iloj de la Potenculoj kaj Riĉuloj, kiuj tiras la fadenojn en la kulisoj. Niaj talentoj, niaj fakultoj kaj niaj vivoj apartenas al tiuj homoj. Ni estas prostituitoj de intelekto. Ĉion tion vi scias same bone kiel mi !”*. Pro tio, precipe post la apero de la Interreto, fondiĝis sendependaj amasinformiloj, i.a. [Washington Free Press](#) kaj [Z Communications](#) iniciate de [William Blum](#).

Plej amara, por Esperanto-parolantoj, estas la fakto ke, jam en 1922, en Munkeno, Hitler publike kondamnis Esperanton kaj atribuis al ĝi, en **"Mein Kampf"**, celon tute fremda al la penso de D-ro Zamenhof sed ja tute konforma al la senskrupula kaj cinika mensostato de la “banksteroj” (kombinaĵo de la radikoj “bank” kaj “gangster”) : *"Tiel longe, kiel la judo ne*

fariĝis mastro super la aliaj popoloj, li vole-nevole devas paroli ilian lingvon, sed tuj kiam tiuj estus liaj servutuloj, ili ĉiuj devus lerni unu universalan lingvon (ekz. Esperanto !), tiel ke ankaŭ per ĉi tiu rimedo la judaro povus regi ilin pli facile“ (64). La lingvo por kiu ekzistis kaj plue ekzistas malpermesoj, malhelpoj, ĉikanoj, kalumnioj, eĉ sub reĝimoj laŭdire "demokrataj", estas Esperanto. La lingvo por kiu ekzistas diktatura devigo ĝin lerni kaj uzi, kaj malhelpo por lerni aliajn, estas ja la angla. Rifuzo ĝin lerni kaj praktiki marĝenigas civitanojn el la socio same kiel neaparteno aŭ nealiĝo al superreganta religio aŭ unika partio sub totalitarismaj reĝimoj en kiuj ununura homo povas kandidatiĝi al prezidenteco.

La mision civilizati la mondon certe ne meritas lando, kiu delonge partoprenas en politiko de disrabado kaj malŝparego de nerenovigeblaj resursoj; lando kiu ne solvis siajn proprajn problemojn; lando kiu tenas en la "libera" mondo rekordojn pri enprizonigo; lando tiel malsekura, ke granda parto el la loĝantaro sentas bezonon posedi armilojn; lando, kie sciencaj esploristoj laboras por sencerbigo kaj mensmanipulado de la civitanoj (65); lando, kiu tiris la mondon al la nuna maljusta kaj ĥaosa ordo; lando, kies vera dio estas la mono. La lando, kiu povas doni al la tuta homaro lecionojn pri bonkonduco ne ekzistas.

Popoloj de la tuta mondo memoru tiujn parolojn de la indiana gvidanto [Tecumseh](#) (vintro 1811-1812) : *“Fratoj, kiam la unuaj blankuloj metis piedon sur nia tero, ili malsatis; ili ne sciis, kie etendi siajn dormkovrilojn kaj kie fari fajron; ili estis malfortaj; ili ne estis kapablaj mem fari ion ajn; niaj patroj kompatis pro ilia mizerego; kaj ili dispartigis kun ilin ĉion kion la Granda Spirito donis al siaj ruĝaj infanoj. Ili havigis al ili manĝaĵon por mildigi ilian malsaton, rimedojn por kuraci iliajn malsanojn; ili etendis bestfelojn sur la grundo por ebligi al ili dormi kaj havigis al ili terpecojn por ebligi al ili ĉasi kaj kultivi maizon. Fratoj, la blankuloj estas tiel, kiel la venenaj serpentoj : kiam ili suferas froston, ili estas malfortaj kaj sendanĝeraj; sed, varmigu ilin, kaj ili revigliĝas por mort-mordi kaj -piki siajn bonfarantojn...”(66)*

Bad (Broken) English or Esperanto ?

La unuaj vortoj de D-ro Zamenhof, kiam li faris malferman paroladon okaze de la 6a Universala Kongreso (Vaŝingtono, 1909), evidentigas, ke pri tiu lando li vidis, kaj eĉ pli imagis ol vidis, nur trompŝajnan fasadon : *“Lando de libereco, lando de estonteco, mi vin salutas ! Lando, pri kiu revis kaj nun ankoraŭ revas multaj suferantoj kaj senkulpaj persekutatoj, mi vin salutas ! Regno de homoj, kiu apartenas ne al tiu aŭ alia gento aŭ eklezio, sed al ĉiuj siaj honestaj filoj, mi klinas min antaŭ vi, kaj mi estas feliĉa, ke la sorto permesis al mi, vin vidi kaj spiri almenaŭ dum kelka tempo vian liberan, de neniu monopoligitan aeron.”* (67)


Zamenhof evidente ne imagis, ke fondiĝo, fortiĝo kaj potenciĝo de Usono efektiviĝis per prirabado kaj masakro de indianoj, per "eksportado" de militoj kaj de abomenindaĵoj samaj kiel tiuj, kiuj ekzistis en lia lando (i.a. pogromoj) sub okupacio de tiamaj eŭropaj potencoj. Li ne imagis ke registaroj de tiu lando, kiun li admiris, premus kun Britio por propraprofite devigi la mondon uzi nur la anglan, por monopoligi ĉion eblan per ĝi. Zamenhof ne imagis, ke pro diableca misuzo de la nomo de Dio — fakte de ties karikaturo, kiu estas homa kreaĵo — por politikaj celoj, evidente ankaŭ en Usono, lia franca samtempulo [Sébastien Faure](#) trovis, jam de 1897, inspiron por prelegoj, gazeto kaj broŝuro sub la titolo "**Les crimes de Dieu**" (La krimoj de Dio) (68).

Neniam kaj nenie en la mondo ekzistis mensmanipulado tiel sistema kaj profunda tamen multe pli subtila ol tiu de la reĝimoj nazia kaj stalina. Ne mankas tiutemaj artikoloj kaj studoj : “*Décervelage à l'américaine*“ (Herbert Schiller, “**Le Monde Diplomatique**“), “*Ces enfants malades de la pub*“ (Paul Moreira, “**Manière de voir**“, n° 31, aŭgusto 1996), “**Propagandes silencieuses**“ kaj “**La tyrannie de la communication**“ (Ignacio Ramonet, Parizo : eld. [Galilée](#)), ktp. Ne temas mondscale pri situacio aŭ rilato en kiu estas "*homoj kun homoj*", laŭ la esprimo de Zamenhof dum la

malfermo de la unua [Universala Kongreso de Esperanto](#) okazinta en [Bulonjo ĉe Maro](#) en 1905, sed pri rilato en kiu regantoj de unu nacio volas, helpe de tiuj de alia nacio, superregi la tutan homaron, pri rilato de "Granda Frato" ("Big Brother"). Tian rilaton evidente Gandhi opiniis, jam en la sama epoko, neakceptebla : “*La angla ne havas lokon en aŭtonomeco*“ (69).

Pro kaŝita aŭ misprezentita ekzisto de alia ebla lingva vojo, la homaro plue kredas, ke ne estas alternativo al la angla kaj ne imagas la eventualecon uzeblan vojon de demokrata elekteleco. Sufiĉas, por granda parto el ĝi, ke tiu lingvo estu uzebla komercele : [English as the Global Language : Good for Business, Bad for Literature](#) (La angla kiel tutmonda lingvo : Bona por komerco, malbona por literaturo). George Soros, kies patro [Teodoro Ŝvarc](#) estis brila uzanto de Esperanto, fondinto de la revuo "[Literatura Mondo](#)" en 1922, respondis al "CBS News", ke li uzis Esperanton junaĝe, sed agnoskis, ke parolata estas nun la angla, la malbona angla : “*It used to be Esperanto, but now it's English. Bad English*“ (70).

Tiu premo por la angla kiel mondlingvo, reduktanta la ceterajn je la nivelo de folkloraj, ne celas ebligi debatojn, kvankam ĝi ja estas uzebla kaj uzata tiucele, sed esence en privilegiitaj socitavoloj. Kiel ne gepatra lingvo, por plejparto el la tutmonda loĝantaro, ĝi malhelpas kaj bremsas fluan komunikadon, konstruan dialogon, debaton kaj interŝanĝon de ideoj pri problemoj i.a. sociaj, ekonomiaj, ekologiaj, politikaj, kulturaj, disvolvaj kaj pri ties eblaj solvoj. En tio, ĝi estas rimedo por malfaciligi kaj eĉ malebligi liberan kaj precizan esprimiĝon, por silentigi homojn, kiuj havas kialojn defendi sin kontraŭ maljustaĵoj aŭ por protesti kontraŭ difinita situacio. Tiel ĝi perfekte ludas la rolon de "[Novparolo](#)" (Newspeak), t.e. nova lingvo kripligita por limigi pensliberecon kaj esprimprecizecon. En tio, ĝuste Basic English inspiris [George Orwell](#), kiam li verkis sian romanon "[1984](#)".




En novembro 2000, ĝuste en la jaro kiam Margaret Thatcher diris ke *"la superreganta lingvo estas la angla"*, usona ĵurnalisto de la usona magazino *"The Atlantic Monthly"*, [Barbara Wallraff](#) sugestis, sub la titolo *"What Global Language"*, ne veti pri la triumfo de la angla : *"Don't bet on the triumph of English"*.

"Yes we can!" (Jes, ni povas !)

Ĉu Barack Obama povus same respondi al demando pri neceso evoluigi la mondan politikon al pli da justeco ? Treege gravas, en ĉiu granda projekto, la kvalito de komunikado, de interkompreniĝo, la dialogebleco. La plej instruata lingvo de la mondo ne estas la plej bone kaj facile regebla, eĉ por denaskuloj. Pri tio atestis multokaze iama tradukisto de UN kaj MOS, [Claude Piron](#). La mondo bezonas referencan lingvon kun neŭtraleco komparebla al tiu de la latina, sed sen ties malbonaĵoj kaj malfacilaĵoj.

En 2006, Barack Obama publikigis libron sub la titolo *"The Audacity of Hope"* (71) . Tian pioniran aŭdacon sur la vojo de espero havis D-ro Zamenhof jam en 1887, kiam li publikigis sian unuan lernolibron de la *"Internacia Lingvo"* sub la pseŭdnomo *"Doktoro Esperanto"*...


Dum la balotkampanjo de 2008, preskaŭ cent jarojn post la Universala Kongreso de Vaŝingtono, Barack Obama esprimis volon



pri gravaj ŝanĝoj kaj anoncis : *"Mi malfermos la pordojn de registaro kaj petas al vi partopreni en via propra demokratio denove"* (72). Pri siaj lingvaj kapabloj li deklaris en Dayton : *"Mi ne parolas fremdan lingvon. Tio estas embarasa !"* (73). Li aldonis ke *"Dum la angla estas certe superreganta lingvo en multaj situacioj tra la tuta mondo, bona scipovo de dua lingvo (ne nur por mendi kafon en Parizo) estas grandega avantaĝo je pluraj niveloj"*.

Kompreneble, laŭ la parolado de fino de

mandato de prezidento Eisenhower, estas ne malfacile imagi ke, kiom ajn bonvolema, sincera kaj kapabla estas Barack Obama, gravaj obstakloj, malhelpoj kaj ĉikanoj aperos



sur lia vojo. Obskuraj fortoj ekspluatas la neneadeblan fakton ke Obama inspiras tutmonde, al multaj homoj, fidon, esperon, eĉ admiron kaj simpatian. La elreviĝo riskas esti des pli dolora... Jam en 1931, Aldous Huxley atentigis pri jena danĝero : "En epoko de progresinta teknologio, la plej granda danĝero por la ideoj, la kulturo kaj la spirito riskas pli veni de malamiko kun ridetanta vizaĝo ol de kontraŭulo inspiranta teroron kaj malamon."

Usona bankisto kaj politikisto, [Louis McFadden](#) (1876-1936) diris la 10an de junio 1936 : "Ni posedas en tiu lando unu el la plej koruptitaj institucioj, kiujn la mondo iam ajn konis. Mi volas paroli pri la Centra Usona Banko. Tiu institucio malriĉigis la civitanojn de Usono kaj preskaŭ kondukis nian registaron al bankroto. Ĉio tio fontas al la fraŭdaj agmanieroj de vulturoj, kiuj regas tiun situacion." McFadden jene difinis

Usonon : "superŝtato regata de bankistoj kaj internaciaj industriistoj, kiuj asociiĝas propraplezure por sklavigi la mondon." (74)

